




# KROATA ESPERANTO-LIGO PREZENTITA EN BRUSELO

**Kulturo moviĝanta** estis la titolo de granda 3-taga brusela programo organizita de **Eŭropa komisiono** kaj ties agentejo **EACEA**. Pli ol 700 kulturaj atkivuloj venis al Bruselo de la **EU-ŝtatoj** kaj **ŝtatoj - kandidatoj por EU** kun la celo interŝanĝi ideojn kaj prezenti 28 el multaj projektoj financataj de **Eŭropa Komisiono** kadre de la Kultura Programo 2007-2013. La prezentado de la kultura programo etendiĝis dum la 3-taga konferenco de la 27a ĝis la 30a de oktobro 2010. En la kategorio **Literaturo**, **Kroata Esperanto-Ligo** havis la okazon prezenti sian projekton titolita **Hindunia infanlibro en Eŭropo – Tri eŭropaj infanlibroj en Hinda Unio**. Al la projekto de KEL estis dediĉita unu paĝo en la grandformata 50-paĝa anglalingva broŝuro. **Spomenka Štimec** prezentis la projekton dum la konferenco per prelego (en la modesta angla) kaj per multaj kontaktoj kun la ĉeestintoj. Dum la Kultura Forumo estis ankaŭ atribuita **Eŭropa literatura premio**, kiun ĉeestis la prezidanto de Eŭropa Komisiono **Jose Manuel Barroso** mem. Juna kroata verkistino el **Dubrovnik Mila Pavičević** gajnis la premion por literaturo - belan skulptaĵon.

Sur la fotoj: titolpaĝo de la EU-broŝuro kaj la paĝo de la kroata projekto en ĝi (supre) kaj la libro de Ministerio pri kulturo kaj la KEL-paĝo en ĝi (malsupre)

